

Stratoj, lernejoj, hospitaloj, murpentraĵoj, grafitio, vitraloj, trajnoj, ŝipoj kaj asteroidoj

Bjalistokaj ZEO-j

- **Monumento al LLZ**, str. Malmeda, aŭtoro: Jan Kucz
- **Strato Ludwika Zamenhofa**, de 1919 - la unua en Pollando
- **Tabulo** ĉe la str. Ludwika Zamenhofa 26. „Ĉi-tie staris la domo en kiu askiĝis la kreinto de la internacia lingvo Esperanto d-ro Ludoviko Zamenhof”
- **Murpentraĵo**, str. Ludwika Zamenhofa 26, aŭtoro: Jerzy Muszyński
- **Strato Esperantystów**
- **Strato Antoniego Grabowskiego**, la kvartalo Bacieczki
- **Centro Ludoviko Zamenhof**, str. Warszawska 19
- **Esperanto-Libraro** - biblioteka filio de Podlaĥia Libraro, str. Warszawska 19
- **Reliefa portreto de LLZ**, str. Warszawska 19, aŭtoro: Jerzy Grygorczuk
- **Memortabulo kun reliefo** prezentanta Ludovikon Zamenhof, str. Warszawska 8
- **Esperanto Cafe**, Rynek Kościuszki 10
- **Hotelo Esperanto**, str. Legionowa 10
- **Klubejo de Fondumo Zamenhof** kaj Bjalistoka Esperanto-Societo, str. Piękna 3
- **Monumento / ŝtono kun tabulo**, str. Piękna 3
- **Kafejeto**, str. Mazowiecka 48
- **Bazlejo** n-ro 51 Ludoviko Zamenhof, la kvartalo Bagnówka
- **Strato Jakuba Szapiro**, la kvartalo Jaroszwówka / Wygoda
- **Memortabulo** al Jakobo Ŝapiro, str. Lipowa 42
- **Itinero de Esperanto kaj Pluraj Kulturoj** - turisma itinero
- **Murpentraĵo** „Liberecon por la Mondo”, str. W. Broniewskiego 23, aŭtoro: Maciej Szupica
- **Monumento al juna Ludoviko Zamenhof**, Rynek Kościuszki / str. Zamenhofa, aŭtoroj: Ryszard kaj Katarzyna Piotrowski
- **Universitata Porinfana Klinika Hospitalo** Ludoviko Zamenhof, str. J. Waszyngtona 17
- **Aŭditorio „Zamenhof”**, str. J. Waszyngtona 17
- **Konferenca salono „Esperanto”**, str. J. Waszyngtona 17
- **Rehabilita ekzerco-salono Lidja Zamenhof**, str. J. Waszyngtona 17

Omaĝe al la kreinto de Esperanto

Ludoviko Zamenhof estas persono konata en la tuta mondo kaj sendube la plej fama bjalistokano. Ĉiujare Centron Ludoviko Zamenhof vizitas multaj homoj el la plej foraj anguloj de la mondo. En multaj lokoj de la terglobo oni honoris Ludovikon Zamenhof kaj lian verkon. La unua objekto en la mondo, kiu ricevis la nomon „Esperanto”, estis hispana ŝipo lanĉita en 1896. La unua monumento simbolanta la ideon de Esperanto estis malkovrita la 31-an de majo 1914, ankoraŭ dum la vivo de Zamenhof, en la ĉeĥa kuraĉloko Františkovy Lázně dum la 4-a Tutaŭstra Esperanto-Kongreso. Dum jaroj multaj stratoj, placoj, bulvaroj ricevis la nomon de Zamenhof, Esperanto aŭ Esperantistoj, kaj ankaŭ kiel patronojn la nomojn de famaj, kutime lokaj, esperantistoj. La ekzemplo povas esti la sennoma strato troviĝanta ene de la kvartalo Jaroszwówka kaj Wygoda en Bjalistoko, kiu en 2017 ricevis la nomon de Jakobo Ŝapiro - elstara bjalistoka esperantisto de la intermilita periodo.

Pli ol 1600 ZEO-j

Firme markitaj objektoj ligitaj kun Esperanto aŭ Zamenhof nomiĝas **ZEO-j** (Zamenhof/Esperanto-Objektoj). Unuafoje la siglon uzis la germana esperantisto Hugo Röllinger en la libro *Monumente pri Esperanto - ilustrita dokumentaro pri 1044 Zamenhof/Esperanto Objektoj en 54 landoj* eldonita en 1997 en Roterdamo dum Universala Kongreso. Ĝis 2001 Röllinger listigis 1260 tiajn objektojn en la mondo. Nun, kun permeso de



UEA, la mision listigi ZEO-jn de la mondo daŭrigas polo, Robert Kamiński el Lodzo. Ĝis 2018 oni eksciis, ke en la mondo ekzistas pli ol 1600 ZEO-j.

Foto-ekspozicio

Fotoj prezentataj en la ekspozicio montras bjalistokajn ZEO-jn, kaj pravas, ke la familia naskiĝurbo de la aŭtoro de la literacia lingvo troviĝas en avangardo de urboj popularigantaj Zamenhofon kaj Esperanton. La aŭtorajn fotojn faris Jerzy Barańczuk laŭ sia propra

koncepto, prezentante 25 bjalistokajn objektojn. La ekspozicion akompanas prezento de lumbildoj kun originalaj fotoj de la bjalistokaj ZEO-j.

La ekspozicio Bjalistokaj ZEO-j en fotoj de Jerzy Barańczuk estis preparita por la 20-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj (13-15 de decembro 2019); la ekspozicio estos malferma ĝis la 19-a de januaro 2020.

(Fot. J. Barańczuk, teksto: K. Lewończuk-Barańczuk)

Jerzy Barańczuk - fotisto, aŭtoro de fotokursoj; de pli ol kvardek jaroj fote dokumentas la socian-kulturan vivon de la loĝantoj de Łapy kaj ĝia regiono; li elpensis kaj iniciatis filman registradon de rakontoj de atestantoj pri la historio de la regiono de Łapy; profesie li okupiĝas pri fasonado, kompostado kaj preparado de eldonaĵoj por presado; li grave kontribuis por realigi albumajn kaj librajn publikaĵojn pri historio; li ciferecigis dekkelkml vitrajn negativojn de elstara antaŭmilita fotisto Władysław Piotrowski; li organizis la foto-plenaerojn, interalie Internacian Plenaeran Fotadon la Valo de Narew, kiun finis grandformata ekspozicio (prezentata ankaŭ en Bjalistoka Kulturcentro en 2008 kaj en Grodno, Belorusio) kaj albuma eldonaĵo. Li estis fotoraportisto dum la dua pilgrimo de Johano Paŭlo la 2-a al Pollando.

Kiu ricevu la Medalon de Toleremo?

Fondumo Zamenhof fondis en 1999 la Medalon de Toleremo. La medalon projektis la bjalistoka artisto Dymitr Grozdeu. Sur la fronta flanko troviĝas du manoj tenantaj branĉeton kaj la vorto „toleremo”. La dorsa flanko havas la vizaĝon de Zamenhof kaj la palacon de Branicki, kiu estas la plej konata historia objekto de Bjalistoko.

La unua medalo estis enmanigita al la papo Johano Paŭlo la 2-a. La medalo estis unu el donacoj, kiujn la papo ricevis dum renkontiĝo kun kredantoj en Drohiczyn.

La Medalon de Toleremo posedas ankaŭ: profesoro Władysław Bartoszewski (2006), Monda Skaŭta Asocio (2006), Jerzy Owsiak (2009), Fondumo Pogranicze (2009), Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia (2013).

Konforme al la regularo de la Fondumo, per la Medalo de Toleremo estas premiataj elstaraj personoj aŭ institucioj interalie pro kompreno kaj respektado de kultura, nacia, seksa aŭ religia diverseco. En la kapitulo de la Medalo de Toleremo troviĝas reprezentantoj de

Esperanto-asocioj, aŭtoritatoj de la urbo Bjalistoko kaj la podlaĥia provinco. Dum la lastaj 6 jaroj la Fondumo premiis neniu per ĉi tiu honora Medalo, ĉar oni ne faris oficialan proponon. Se aperos propono, oni aplikos la medalan proceduron. Kandidaton por la Medalo de Toleremo oni povas proponi en ĉiu momento, sendante la proponon (nomo, mallonga argumentado) al la retadreso: **fondumo@gmail.com**. Kandidaton por la medalo proponi rajtas ĉiu, ne nur esperantisto.

Ĉeokaze valoras mencii, ke informoj pri la Medalo de Toleremo aperos en la internacia numismatika katalogo „Moneroj kaj Medaloj” eldonata kaj aktualigata de multaj jaroj sub la redaktado de Bert Boon.

**MEDALO DE TOLEREMO**

Aŭtoro: Dymitr Grozdeu
Diametro: 115 mm Dikeco: 7 mm
Pezo: 501 g Metallo: orita bronzo
Fronta flanko: „Bjalistok L.L. Zamenhof”
Dorsa flanko: „Tolerancja - Toleremo”